# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.eu/hale/k78.pdf




| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1988 | | | | Decembro (1) |
| 1989 | Aprilo (2-3) | | | Otobro (4) |
| 1990 | Januaro (5) | Aprilo (6) | Julio (7) | Oktobro (8) |
| 1991 | Januaro (9) | Aprilo (10) | Julio (11) | Oktobro (12) |
| 1992 | Januaro (13) | Aprilo (14) | Julio (15) | Oktobro (16) |
| 1993 | Januaro (17) | Aprilo (18) | Julio (19) | Oktobro (20) |
| 1994 | Januaro (21) | Aprilo (22) | Julio (23) | Oktobro (24) |
| 1995 | Januaro (25) | Aprilo (26) | Julio (27) | Oktobro (28) |
| 1996 | Januaro (29) | Aprilo (30) | Julio (31) | Oktobro (32) |
| 1997 | Januaro (33) | Aprilo (34) | Julio (35) | Oktobro (36) |
| 1998 | Januaro (37) | Aprilo (38) | Julio (39) | Septembro (40) |
| 1999 | Januaro (41) | Aprilo (42) | Julio (43) | Oktobro (44) |
| 2000 | Januaro (45) | Julio (46) | Oktobro (47) | Novembro (48) |
| 2001 | Januaro (49) | Aprilo (50) | Julio (51) | Oktobro (52) |
| 2002 | Januaro (53) | Aprilo (54) | Oktobro (55) | Decembro (56) |
| 2003 | Januaro (57) | Aprilo (58) | Julio (59) | Oktobro (60) |
| 2004 | Januaro (61) | Aprilo (62) | Julio (63) | Oktobro (64) |
| 2005 | Januaro (65) | Aprilo (66) | Julio (67) | Oktobro (68) |
| 2006 | Januaro (69) | Aprilo (70) | Julio (71) | Oktobro (72) |
| 2007 | Januaro (73) | Aprilo al decembro (74) | | |
| 2008 | Januaro \| Marto \| Majo \| Julio \| Septembro \| Novembro | | | |

Depósito legal: Z-2398-88
Enkonduko kaj indekso

Terminado

Nro 78a Majo/junio de 2009

Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE)

ISSN 1697-6460

*Prezidanto:* **Juan A. Cabezos Martínez,**
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Adreso: c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Jorge Pavón,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Vytautas Ŝilas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: Gazetoteko Lanti.

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

# Enhavo

Redaktore: *Gazetoteko Lanti*..... 3
Parolas la Prezidanto ................ 4
Universalaj Kongresoj ............... 5
La Faraono, ĉapitro 24ª ........... 10


*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

Redaktore

# Gazetoteko Lanti




Antaŭ unu jaro mi estis dironta al vi, ke kelkaj numeroj de nia magazino ne estas legeblaj per html kodo ĉe niaj retejoj. Tio estas problemo, kiun mi intencis solvi baldaŭ, sed dum kelke da tempo tio restos tiel. Tamen, oni ĉiam povis legi ĝin en la pdf-a formato en la samaj lokoj, www. gazetoteko.eu/hale kaj www.gazetotekolanti .com/hale.

La Gazetoteko Lanti kreskas iom post iom, kaj tiurilate ĉian helpon estos agnoskata kaj dankata. Antaŭ kelkaj monatoj mi ĉeestis la Muzeon de Esperanto, apud Barselono, kaj mi enretigis kelkajn malnovajn magazinojn en Esperanto, kiujn mi trovis tie. Mi ne faris pli, ĉar mi estas nur unu homo. Se neniu helpas, mi ne rezignos, tamen, kaj iom post iom mi daŭrigos la aferon. Sed aliajn homojn mi elkore invitas kunlabori tiucele, ke la malnovaj magazinoj de Esperanto neniam malaperu. La iluzio per kiu oni verkis tiujn artikolojn en ili, kaj la iluzio, per kiu oni legis ilin, ne meritas forgeson.

Tial, ne nur la Gazetotekon mi enretigas, sed ankaŭ fojfoje ni donacas subskribantojn de *Kajeroj el la Sudo* per dvd-a versio de la gazetoteko en sia aktuala stato.

Elkore,

Jesuo

# Parolas la Prezidanto

Estimataj HALEanoj!



De nove la krizo, krizo por la malriĉuloj sed ne krizo por la riĉuloj Kial? La riĉuloj havas altajn premiojn, logike ke kiam la entrepreno gajnas monon la estraranoj de la entreprenoj havas premiojn.

Sed en kapitalismo kiam la entrepenoj havas monon, la estraranoj havas premion, kaj kiam la entrepreno ne havas monon la estraranoj, ankaŭ, havas premion.

Tio estas la logiko de kapitalismo.

Mi legas en ĵurnalo pri manifestacio en Usono, la popolo usona manifestacias kaj petas Obamon, ke li ne helpu la entreprenojn. La merkato, la ideologio de la merkato uzindas de estraranoj de entreprenoj, kiam ili diras ke salajroj ne plialtiĝas pro la merkato, la laboristoj ne havas rajtojn pro la merkato, kaj kiam la entrepreno ne gajnas monon, pro la merkato, la estraranoj de la firmaoj petas helpon de la Ŝtato kaj la popolo de Usono manifestacias kun la slogano "la merkato diras ne helpu la malbonajn entreprenojn".

Obamo estas la nova prezidento de Usono, kaj li diferenciĝos de Buŝ se li almenaŭ havas inteligenton, socian inteligenton.

Ĉu Obamo venkos la krizon?

Ĉu la progresemaj homoj venkos la krizon?

Mi esperas, ke jes

*Johano Cabezos,*
*Prezidanto de HALE*

# Universalaj Kongresoj

*Nun vi havas la sanon kaj la monon. Kiam vi jam jariĝis multe, vi ankoraŭ havos la monon, sed ne plu la sanon partopreni kongresojn de Esperanto, sekve mi konsilas al vi, ke eĉ se vi nun ne havas monon, vi pruntepren u ĝin kaj kongresumu, kaj pagu eĉ tiam, kiam vi ne plu havos sanon*. Jen unu el la plej mirindaj konsiloj, kiujn oni iam diris al mi. Tiu konversacio temis pri la Kongreso de Montpellier je 1998, kaj de tiam mi senĉese vojaĝis al UK-oj, escepte de tiu de Svedio, pro familiaj kialoj.

Pro tio mi havas mirindajn memoraĵojn pri Francio, Germanio, Israelo, Kroatio, Brazilo, Ĉinio, Litovio, Italio, Japanio, kaj esperas havi novajn el aliaj landoj, kiujn mi vizitos en la estonto, dum mi havas sanon.

Kelkaj samideanoj, kiujn mi konis en tiuj kongresoj, jam forpasis. Mi povas diri, ke mi havis la bonŝancon koni ilin. Elstare inter ili rangas Dimitar Terzjev, Gilberto Ledon, Claude Piron kaj Giordano Moya. La unua estis muzikisto, kies muzikon oni ankoraŭ kantas en la Universalaj Kongresoj, ĉefe sia infano, la Internacia Koruso; la dua estis kara samideano de mia restado en SAT, grava esperantisto, kiu multe agis por nia afero, eldonante kelkajn librojn kaj magazinojn, inter ili ***Liberecana Ligilo***, ĝis maldeca kaj maljusta klaĉado devigis lin forlasi tiun entreprenon; la tria estis elstara esperantisto, kies verkoj abundas kaj en Esperanto kaj pri Esperanto..., se menciendas du inter ili, ni relegu ***Gerda Malaperis*** kaj ***Le defi des langues*** (La defio de lingvoj[1]). Kaj la kvara, lasta sed ne malpli grava, bonkora esperantisto kaj verkisto, kiun mi trovis sufiĉe ofte en hispanaj renkontiĝoj esperantaj, kune kun lia edzino, kiu ankaŭ forpasis kelkajn monatojn antaŭ li. La lastan fojon, kiam mi trovis lin, li loĝis en oldulejo proksime de Barselono. Li ne rekonis min, ĉar li suferis malsanon, kiu forgesigas lin pri homoj kaj aferoj. Sed lia uzo de nia lingvo Esperanto estis perfekta. Mi miris pri tiu

[1] Kies traduko en la hispanan mi mem faris en la naŭdekaj jaroj, kaj post kelkaj misrenkontoj, mi sendis al amiko brazila, por publikigo...

afero. Ĝordano Moja estis tre amika al ***Kajeroj el la Sudo***, kaj sekve multas la artikoloj, kiujn li publikigis ĉi tie.

Je numero 75ª ni parolis pri la Kongreso de Japanio. Preskaŭ jaro pasis de la Kongreso de Rotterdamo, kaj mi ankoraŭ ne rakontis al vi, ĉefe pro tio, ke nia magazino ne aperis sufiĉe akurate. La memoro pri ĝi jam velkas, sed mi ankoraŭ memoras la kuneston kun esperantistoj de la unua tago, kiam mi venis en tiu gravan urbon de Nederlando. Mi loĝis sufiĉe proksime de la Kongresejo, proksimume 200 metrojn, kaj surprizis min, ke ĝia ĉiutaga nomo estas *World Trade Center*, Monda Komerca Centro, same kiel la faligitaj Ĝemelaj Turoj de Novjorko. Tamen ni havis neniun problemon pro tio.




Problemo havis tiujn, kiuj alvenis ne sufiĉe frue al kongresejo, ĉar *pro devigo de fajristoj* (laŭ la oficiala informo, publikigita tra laŭtparoliloj,

kaj duonprimokita de Jomo) *en la halo ne estis loko por ĉiuj gekongresanoj*, fakte nur por kelkaj centoj. Tiuj, kiuj malfruiĝis — kiel mi, hontas diri mi— devis sekvi la paroladojn en tre longa kaj granda halo pere de televidoj. Tio kaŭzis ĝenon kaj koleron al multaj, ĉefe ĉar kelkaj profitis la ŝancon por paroli inter si, sciante, ke ili ne ĝenas la parolanton. Sed ja ĝenis la aŭskultantojn.

Sed tiu salono ankaŭ estis uzata por aliaj aferoj, kiel koncertumi *salone* anstataŭ *koridore,* kiel kuba Ĥuljan' montras en la apuda foto. Verŝajne li estos grava homo en la loka komitato en la UK de la venonta jaro, 2010.



La cetera parto de la kongreso ne estas facile resumi per malmultaj vortoj. Estis granda halo, kie nederlandaninoj disvendis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj fronte al ilia budo estis aliaj budoj, kie oni avertis pri siaj diversaj interesoj pere de Esperanto. Meze de tiu centra halego mi vivis diversajn rendevuojn kun amikaj kaj malpli amikaj geesperantistoj. Elirante al la pordo el tiu loko estis fontano, kie estis agrable apudsidiĝi kaj ripozi, aŭ paroli kun geamikoj. Fronte al la fontano estis elirejo de la granda koncerthalo, aŭ konferenciejo, kie ne estis loko por ni ĉiuj. Kompreneble, la ceterajn tagojn mi sufiĉe frue estis tie por kapti lokon. Escepte

de unu tago, okaze de la plej brila kongresero, kvankam laŭ kelkaj esperantistoj, ne tiom grava: La Internacia Vespero. Antaŭ kelkaj kongresoj, dum tiu de Ĉinio, knabino el Usono diris al mi, ke tio estis *ne profesie, malriĉe* farita. Eble tio povas esti vera pri kelkaj eroj, sed tiel estas ni, esperantistoj, kiuj festumas la kontribuojn de ni, komuna popolo, kaj ne necese de Yehudin aŭ Alfredo Nobel'. Ĉar Esperanto ne estis desegnita por tiuj geniuloj, sed por komuna homo, kiel ni ĉiuj estas, po unu. Sed pri aliaj eroj tiu kritiko estas tute nejusta kaj maldeca. Venas al mia penso *Desperado* kaj *Nataŝa kaj Ĵomart'*, kiuj estas tute ne *amatoraj*, kaj ankaŭ multaj aliaj.

Je la fino de tiu *Internacia Vespero*, kie gravis —kiel kutime— multe pli la kunesto ol la eroj, mi memoras kortuŝan momenton tie, sur la fontano, apud la elirejo, de Desperado kaj Nataŝa kaj Ĵomart', kaj ni ĉiuj, kantante esperante Esperanton, kriante, ke vivu la verda stel', ĉar ni estu la verda stel'.

La Kongresa temo estis *Lingvoj, trezoro de l' homaro*, kaj dum la diskutoj pri la kongresa temo mi




aŭdis kelkajn kutimajn barbaraĵojn inter esperantistoj, kiel tiun, ke oni devas paroli multe da lingvoj, kaj ke la angla estas la natura malamiko de Esperanto. Pli amatoraj kiel konkludantoj ol kiel muzikistoj aŭ artistoj estas esperantistoj, se inter ni estas

komuna monero tiaj sentaŭ-gaĵoj...

Sed mi menciu, ke dum la kongreso de Rotterdamo, mi havis la eblecon viziti la sidejon




de la Universala Esperanto Asocio. Mi vidis la lokon, kie niaj oficistoj laboras, kie la plej granda biblioteko de Esperanto en la mondo kuŝas, per tre sprita sistemo, kiu ebligas ke ne ekzakte la libroj, sed la koridoro inter la libraroj *moviĝas* de flanko al flanko, tiel, ke oni povas konservi multe pli grandan nombron da libroj en tre malgranda loko, fakte nur unu ĉambro. Fakte, nur virtuala biblioteko estus pli malgranda... Mi vizitis ĝin tagmeze, antaŭ iri manĝi, kaj mi vidis, ke estis kelkaj esperantistoj tie. Mi havis malagrablan sperton tie, ĉar ĉiuj volis fotiĝi apud tiuj magiaj, kvazaŭ *abrakadabraj* vortoj, kiujn oni povas legi en la apuda foto, *Universala Esperanto Asocio*. Sed mi venis frapi la pordon, vidi, ĉu eblas viziti..., kaj subite estis puŝata de esperantisto de fora lando, kiuj per manoj esprimis sin pli facile kaj rapide ol per Esperanto...

Rapide mi forgesis tion, sub la ĉiĉeronado de Fransisko, kiu klarigis nin pri la labormaniero en nia sidejo.

Venintfoje ni kongresumis en la lando, kiu vidis lumon iniciatinto de Esperanto unuafoje, Bjalistoko, Pollando.Sed lasu min ripozi, kaj rakonti tion al vi en la venonta numero...


*Jesuo*

# La faraono

## Ĉapitro 24ª

Nun jam Ramzes sciis, ke aŭ li ne plenumos la ordonon de l' faraono, aŭ li devas sin submeti al la volo de l' pastroj, kaj tio plenigis lin per kolero kaj malfavoro por ili.

Li do ne rapidis al la misteroj, kaŝitaj en la temploj. Ne venis ankoraŭ la tempo por la fastoj kaj preĝoj. Sed tiom pli favore li komencis partopreni en la festenoj, kiujn oni aranĝis por lia honoro.



Ĵus revenis Tutmozis —majstro en ĉiuj amuzoj, kaj alportis al la princo bonajn novaĵojn de Sara. Ŝi estis sana kaj havis belan aspekton, kio nun malpli interesis Ramzeson. Sed la pastroj faris tiel bonan horoskopon al lia estonta infano, ke Ramzes estis ravita.

Ili certigis plej kategorie, ke la infano estos filo, favorata de l' dioj kaj, se la patro ĝin amos, ĝi atingos en la vivo grandajn honorojn.

La princo ridis la duan parton de la profetaĵo.

—Stranga estas ilia saĝo! —diris li al Tutmozis— Ili scias, ke ĝi estos filo, kion ne scias mi, kvankam mi estas la patro; sed ili dubas, ĉu mi ĝin amos, kvankam facile estas diveni, ke mi amus ĉi tiun infanon, eĉ se ĝi estus filino.

Kaj pri la honoroj por ĝi ili estu trankvilaj. Mi zorgos pri tio!

En la monato Pahono (januaro-februaro) la kronprinco transveturis en la nomeson Ka, kie akceptis lin la nomarĥo Sofra. La urbo Anu kuŝis sep horojn de pieda vojo de Atribis, sed la princo uzis tri tagojn por ĉi tiu vojaĝo. Pensante pri la preĝoj kaj fastoj, kiuj atendis lin antaŭ la malkovro de l' templaj misteroj, Ramzes sentis pli kaj pli grandan inklinon al la amuzoj; lia sekvantaro

divenis tion, plezuro do sekvis plezuron.

Ree sur la vojoj, tra kiuj li veturis al Atribis, aperis popolaj amasoj kun krioj, floroj kaj muzikistoj. Precipe proksime de l' urbo la entuziasmo atingis la supron. Okazis eĉ, ke grandega laboristo sin ĵetis sub la veturilon de la vic-reĝo. Kaj kiam Ramzes haltigis la ĉevalojn, el la amaso eliris dekkelko da junaj virinoj kaj ĉirkaŭplektis lian veturilon per floroj.

—Tamen ili amas min!..-— pensis la princo.

En la provinco Ka li ne demandis plu la nomarĥon pri la enspezoj de l' faraono, ne vizitis fabrikojn, ne ordonis legi al si raportojn. Nur foje, kiam li vidis, ke la templo de l' dio Sebak staras sur alta monteto, li esprimis deziron suriri ĝian supron kaj rigardi la ĉirkaŭaĵon.

La respektinda Sofra tuj plenumis la volon de l' kronprinco, kiu suririnte la turon, kun granda plezuro pasigis tie kelke da horoj.

La provinco Ka estis fruktodona ebenaĵo. Kelkdeko da kanaloj kaj da nilaj brakoj tranĉis ĝin en ĉiuj direktoj, kaj ĝi ŝajnis kvazaŭ reto el arĝentaj kaj lazuraj ŝnuroj. La melonoj kaj tritiko, semitaj en novembro, jam estis maturiĝantaj. Sur la kampoj svarmis nudaj homoj, kiuj kolektis kukumojn aŭ semis kotonon. La tero estis kovrita de konstruaĵoj, kiuj en kelkdeko da punktoj grupiĝis pli multenombre kaj formis urbetojn.

La plimulto da domoj, precipe tiuj, kiuj kuŝis inter kampoj, estis argilaj, kovritaj per pajlo kaj palmaj folioj. Kontraŭe, en la urboj la domoj estis brikaj, kun plataj tegmentoj, kaj similis blankajn kubojn, truitajn en la lokoj, kie estis la fenestroj kaj pordoj. Tre ofte sur unu tia kubo staris plia malpli granda, kaj sur tiu tria, ankoraŭ malpli granda, kaj ĉiu etaĝo estis alie kolorigita. Sub la bruliganta suno de Egipto ĉi tiuj domoj similis grandajn perlojn; rubenojn kaj safirojn, dissemitajn inter la verdaĵo de l' kampoj kaj ĉirkaŭitajn de palmoj kaj akacioj.

De tiu loko Ramzes rimarkis fenomenon, kiu mirigis lin: proksime de la temploj la domoj

estis pli belaj, kaj sur la kampoj laboris plej multe da homoj.

—La bienoj de l' pastroj estas la plej riĉaj!..-— rememoris li kaj ankoraŭ unu fojon trakuris per la okuloj la templojn kaj kapelojn, dekkelkon da kiuj oni vidis de la turo.

Sed ĉar li paciĝis kun Herhor kaj bezonis servojn de l' pastroj, li ne volis pli longe sin okupi per ĉi tiu afero.

En la daŭro de la sekvintaj tagoj Sofra aranĝis por la princo serion da ĉasoj, irante de la urbo Atribis al la oriento. Apud la kanaloj oni arkpafis birdojn, kaptis ilin per grandegaj retoj, kiuj per unu fojo envolvis po kelkdeko, aŭ oni sendis falkojn kontraŭ la libere flugantaj. Kaj kiam la princa sekvantaro atingis la orientan dezerton, komenciĝis grandaj ĉasoj kun hundoj kaj panteroj kontraŭ kvarpiedaj bestoj; dum kelke da tagoj oni kaptis kaj mortigis kelkcenton da ili.

Kiam Sofra rimarkis, ke la princo jam havas sufiĉe da plezuro sub la libera ĉielo kaj da noktoj sub la tendo, li interrompis la ĉasadon kaj per plej mallongaj vojoj rekondukis la gastojn al Atribis.

Ili venis tien en la kvara horo post la tagmezo, kaj la nomarĥo invitis ĉiujn en sian palacon al festeno.

Li mem kondukis la princon en la banejon, asistis ĉe la bano kaj el sia propra kesto prenis parfumojn por olei Ramzeson. Poste li kontrolis la friziston, kiu ordigis la harojn de l' vic-reĝo, fine, ekgenuinte sur la planko, li petis la princon akcepti novajn vestojn.

Estis tie freŝe teksita ĉemizo, kovrita per brodaĵoj, antaŭtuko ornamita per perloj kaj mantelo punktita per oro, tre fortika, sed tiel delikata, ke du manoj povis ĝin enteni.

La kronprinco favore akceptis ĉion kaj diris, ke neniam ankoraŭ li ricevis tiel belan donacon.

La suno jam subiris, kaj la nomarĥo kondukis la princon en la balan salonon.

Tio estis granda vestiblo, ĉirkaŭita per kolonaro kaj pavumita per mozaiko. Ĉiuj muroj estis kovritaj per pentraĵoj, prezentantaj scenojn el la vivo de l'

antaŭuloj de Sofra: militojn, marajn vojaĝojn kaj ĉasojn. Super ĉi tiu konstruaĵo, anstataŭ tegmento, pendis grandega papilio, kun multkoloraj flugiloj, kiujn movis kaŝitaj sklavoj, por refreŝigi la aeron.

En bronzaj torĉujoj, fiksitaj sur la kolonoj, brulis helaj torĉoj, eligante bonodorajn fumojn.

La salono estis dividita en du partojn: unu malplena, la alia plenigita per tabloj kaj seĝoj por la invititoj. En la fundo estis alta estrado, sur kiu sub riĉa tendo staris malgranda tablo kaj kanapo por Ramzes.

Apud ĉiu tablo estis grandaj vazoj kun akacioj, palmaj kaj figaj arboj. La tablon de l' kronprinco oni ĉirkaŭis per pinglokreskaĵoj, kiuj dissendis en la salono balzaman odoron.

La kunvenintaj gastoj salutis la princon per ĝoja ekkrio, kaj kiam Ramzes okupis la lokon sub la baldakeno, de kie oni povis libere vidi la tutan salonon, lia sekvantaro sidiĝis ĉe la tabloj.

Eksonis harpoj kaj komencis eniri sinjorinoj, en riĉaj muslinaj vestoj, kun malkovritaj brustoj kaj brilantaj de juveloj. Kvar plej belaj ĉirkaŭis Ramzeson, aliaj sidiĝis apud la altranguloj de la sekvantaro.



En la aero fluis odoro de rozoj, konvaloj kaj violoj. La princo sentis, ke la pulso batas en liaj tempioj.

Sklavoj kaj sklavinoj en ĉemizoj blankaj, rozaj kaj bluaj komencis disporti kukojn, rostitajn kortbirdojn kaj ĉasaĵon, fiŝojn, vinon kaj fruktojn, fine florajn kronojn, kiujn la festenantoj metis sur la kapon. La grandega papilio pli kaj pli rapide svingis siajn flugilojn, kaj en la malplena parto de la salono komenciĝis spektaklo. Unuj post aliaj aperis dancistinoj, gimnastikistoj, arlekenoj, ĵonglistoj kaj skermistoj. Kiam iu montris neordinaran lertecon, la spektatoroj ĵetis al li florojn el siaj kronoj, aŭ orajn ringojn.

La festeno daŭris kelke da horoj; aklamoj por honori la princon, nomarĥon kaj lian familion senĉese sekvis unu la alian. Ramzeson, kiu duone kuŝis sur la kanapo kovrita per leona felo, kun oraj ungegoj, servis kvar damoj. Unu ventumis lin, dua ŝanĝis la kronojn sur lia kapo, du aliaj donis al li manĝaĵojn. Ĉe la fino de la festeno tiu, kun kiu la princo plej volonte parolis, alportis al li pokalon da vino. Ramzes eltrinkis duonon, la reston donis al ŝi, kaj kiam ŝi eltrinkis, li kisis ŝian buŝon.

La sklavoj komencis rapide estingi la torĉojn, la papilio ĉesis movi la flugilojn kaj en la salono fariĝis nokto kaj silento, interrompata nur de la nerva rido de l' virinoj.

Subite eksonis rapidaj paŝoj de kelke da homoj kaj terura krio.

—Ellasu min!..-— kriis raŭka vira voĉo-— Kie estas la kronprinco?... Kie estas la vic-reĝo?...

En la salono ekbolis. La virinoj ploris teruritaj, la viroj kriis:

—Kion tio signifas?... Atenco kontraŭ la kronprinco!... Ĉi tien la gardistoj!...

Oni aŭdis la bruon de la rompataj vazoj kaj la krakon de la seĝoj.

—Kie estas la kronprinco? — kriegis la fremda homo.

—Gardistoj!... Defendu la kronprincon!..— oni kriis en la salono.

—Ekbruligu la lumon!..— eksonis la junula voĉo de l' kronprinco-— Kiu serĉas min?... Jen mi estas!...

Oni alportis torĉojn. En la salono senorde kuŝis la renversitaj kaj rompitaj mebloj unuj sur

aliaj, kaj inter ili sin kaŝis la festenantoj. Sur la estrado la princo penis sin forŝiri de la virinoj, kiuj ĉirkaŭprenis liajn manojn kaj piedojn. Apud la princo, Tutmozis en senorda peruko, kun bronza kruĉo en la mano, estis preta bati je la kapo ĉiun, kiu proksimiĝus.

En la pordo aperis kelke da soldatoj kun nudaj glavoj.

—Kio estas?... Kiu estas ĉi tie —kriis la terurita nomarĥo.

Fine oni rimarkis la kulpan. Iu grandegulo, nuda, kovrita de koto, kun sangaj strioj sur la dorso, genuis sur la ŝtupoj de la estrado kaj etendis la manojn al la kronprinco.

—Jen la krimulo!..-— kriis la nomarĥo-— Kaptu lin!...

Tutmozis levis sian kruĉon, de la pordo alkuris soldatoj. La vundita homo falis vizaĝe sur la ŝtuparon, kriante:

—Kompaton, suno de Egipto!...

La soldatoj jam estis lin kaptontaj, kiam Ramzes, forŝirinte sin de l' virinoj, proksimiĝis al la mizerulo.

—Ne tuŝu lin! —kriis Ramzes al la soldatoj-— Kion vi volas, homo?

—Mi volas rakonti al vi mian mizeron, sinjoro...

En ĉi tiu momento Sofra, proksimiĝinte al la princo, murmuretis:

—Li estas Hiksos,.. rigardu, via ekscelenco, lian densan barbon kaj harojn... Lia trobraveco, kun kiu li superforte venis ĉi tien, pruvas, ke ĉi tiu krimulo ne estas Egiptano...

—Kiu vi estas? —demandis la princo.

—Mi estas Bakura, laboristo de la regimento de fosistoj en Sohem. Ni ne havas nun okupon, do la nomarĥo Otoes ordonis al ni...

—Li estas drinkulo kaj frenezulo!..— murmuretis la tremanta Sofra.

—Kiel li parolas al vi, sinjoro...

La princo tiel ekrigardis la nomarĥon, ke la altrangulo, kliniĝinte ĝis la tero, posteniris.

—Kion ordonis al vi Otoes? —demandis la vic-reĝo Bakuran.

—Li ordonis al ni, sinjoro, promeni sur la bordo de Nilo, naĝi en la rivero, stari apud la vojoj kaj fari bruon por via honoro. Li promesis pagi al ni por tio, kiom oni ŝuldas al ni... ĉar, sinjoro, jam de du monatoj ni ricevis nenion... Nek hordean panon, nek fiŝojn, nek oleon por nia korpo.

—Kion vi diros nun, respektinda sinjoro? —demandis la princo la nomarĥon.

—Danĝera drinkulo... abomena mensogulo..-— respondis Sofra.

—Kian bruon vi faris por mia honoro?

—Kiel oni ordonis —diris la grandegulo-— Mia edzino kaj filino kriis kun la aliaj: «Li vivu eterne!» kaj mi saltadis en la akvon kaj ĵetadis kronojn en la ŝipon de via ekscelenco, por kio oni promesis al mi pagi po unu uteno. Kaj kiam vi bonvolis favore enveturi en la urbon Atribis, mi estis destinita minĵeti sub la ĉevalojn kaj haltigi la kaleŝon...

La princo komencis ridi.

—Vere mi ne pensis —diris li —ke ni tiel gaje finos la festenon!... Kaj kiom oni pagis al vi por tio, ke vi devis vinĵeti sub la ĉevalojn?

—Oni promesis al mi tri utenajn, sed pagis nenion, nek al mi, nek al la edzino, nek al la filino. Same al la regimento oni donis nenion por manĝi tiujn du monatoj.

—Per kio do vi vivas?

—Per almozoj, aŭ per tio, kion ni ricevas por nia laboro ĉe la kamparanoj. Do en ĉi tiu terura mizero ni trifoje ribelis kaj volis reveni hejmen. Sed la oficiroj kaj skribistoj aŭ promesis pagi al ni, aŭ ordonis nin bati...

—Pro la bruo por mia honoro? —demandis la princo, ridante.

—Vi diras la veron, princo... Tial hieraŭ estis la plej granda ribelo, pro kiu la nomarĥa Sofra ordonis nin dekumi. Ĉiu deka ricevis bastonadon, kaj mi plej multe, ĉar mi estas granda kaj devas nutri tri buŝojn: mian, de l' filino kaj edzino... Batita, mi min elŝiris el iliaj manoj, por fali sur la ventron antaŭ vi, sinjoro, kaj rakonti niajn dolorojn. Vi, vi batu nin, kiam ni estas kulpaj, sed la skribistoj pagu al ni niajn

ŝuldojn, ĉar alie ni mortos de malsato, ni, niaj edzinoj kaj infanoj...

—Tio estas homo, loĝata de demono!..-— ekkriis Sefra-— Bonvolu, princo, rigardi, kian ruinigon li faris ĉi tie... Dek talentojn mi ne akceptus por ĉi tiuj tabloj, pladoj kaj kruĉoj...

Inter la festenantoj, kiuj jam rekonsciiĝis, komenciĝis murmuro:

—Tio estas ia fripono!..-— oni diris-— Rigardu; vere, li estas Hiksos. Ankoraŭ bolas en li la malbenita sango de liaj avoj, kiuj invadis kaj ruinigis Egipton... Tiel riĉaj mebloj... tiel helaj vazoj... rompitaj en polvon!

—Unu sola ribelo de nepagitaj laboristoj alportas pli grandan malutilon al la ŝtato, ol valoras ĉi tiuj riĉaĵoj —diris severe Ramzes.

—Sanktaj vortoj!... Oni devas skribi ilin sur la monumentoj — tuj eksonis multaj voĉoj inter la gastoj-— La ribelo forŝiras la homojn de la laboro kaj malĝojigas la koron de lia sankteco... Ne konvenas, ke la laboristoj dum du monatoj ne ricevu salajron...

Kun nekaŝata malestimo ekrigardis la princo la korteganojn, ŝanĝiĝemajn kiel la nuboj, kaj sin turnis al la nomarĥo.

—Mi transdonas al vi —diris li severe —ĉi tiun martiritan homon. Mi estas certa, ke neniu haro falos de lia kapo. Kaj morgaŭ mi volas vidi la regimenton, al kiu li apartenas, kaj konvinkiĝi, ĉu la plendanto diris veron.

Post ĉi tiuj vortoj la vic-reĝo eliris, lasante la nomarĥon kaj gastojn en granda malĝojo.

En la sekvinta tago la princo, vestante sin kun la helpo de Tutmozis, demandis lin:

—Ĉu la laboristoj venis?

—Jes, sinjoro. De la leviĝo de l' suno ili atendas viajn ordonojn.

—Kaj tiu... tiu Bakura, ĉu li estas inter ili?

Tutmozis faris grimacon kaj diris:

—Okazis, io stranga. Sofra ordonis lin ŝlosi en malplena kelo de sia palaco. Kaj ĉi tiu

fripono, tre forta homo, rompis la pordon de la najbara kelo, kie estis vino, renversis kelke da multvaloraj kruĉoj kaj tiel ebriiĝis, ke...

—Ke? —demandis la princo.

—Ke li mortis.

La kronprinco salte leviĝis de l' seĝo.

—Kaj vi kredas, ke li mem ebriiĝis tiel, ke li mortis?...

—Mi devas kredi, ĉar mi ne havas pruvojn, ke oni lin mortigis —respondis Tutmozis.

—Sed mi, mi serĉos ilin —eksplodis la princo.

Li kuris en la ĉambro kaj ronkis, kiel kolera leonido.

Kiam li iom trankviliĝis, Tutmozis diris:

—Ne serĉu, sinjoro, kulpon tie, kie oni ne vidas ĝin, ĉar vi ne trovos eĉ atestantojn. Se iu efektive, ordonita de l' nomarĥo, sufokis ĉi tiun laboriston, li tion ne konfesos; la mortinto mem diros nenion, cetere, kian valoron havus lia plendo kontraŭ ia nomarĥo!... En tiaj kondiĉoj neniu tribunalo volos komenci juĝan esploron.

—Sed se mi ordonos?..-—demandis la vic-reĝo.

—En tia okazo oni tion faros kaj oni pruvos la senkulpecon de Sofra. Tiam vi, sinjoro, devos honti, kaj ĉiuj nomarĥoj, iliaj parencoj kaj servistoj fariĝos viaj malamikoj.

La princo staris en la mezo de l' ĉambro kaj pensis.

—Fine —diris Tutmozis —ĉio ŝajnas pruvi, ke ĉi tiu malfeliĉa Bakura estis drinkulo, aŭ frenezulo kaj antaŭ ĉio —homo de fremda deveno. Ĉar ĉu vera kaj prudenta egiptano, eĉ se li tutan jaron ne ricevis salajron kaj duoblon da bastonoj, ĉu li kuraĝus eniri superforte en la palacon de nomarĥo kaj per tiaj krioj alvoki vin?

Ramzes klinis la kapon. Vidante, ke en la najbara ĉambro estas korteganoj, li diris per mallaŭta voĉo:

—Ĉu vi scias, Tutmozis, ke de la tempo, kiam mi entreprenis ĉi tiun vojaĝon, Egipto komencas ŝajni al mi tute alia. Iafoje mi demandas min mem: ĉu mi estas en fremda lando? Aŭ mia koro estas maltrankvila, kvazaŭ mi

havus kovrilon sur la okuloj, post kiu oni faras ĉiujn friponaĵojn, sed kiujn mi ne povas vidi...

—Kaj tial vi ne penu vidi, ĉar fine ŝajnos al vi, ke ni ĉiuj devas esti kondamnitaj en la minejojn —diris Tutmozis kun rido-— Memoru, ke la nomarĥoj kaj oficistoj estas paŝtistoj de viaj brutaroj. Se iu melkos mezuron da lakto por si, aŭ buĉos ŝafinon, vi ne mortigos lin, nek forpelos. Da ŝafinoj vi havas tro multe, kaj paŝtistojn ne facile estas trovi.

La vic-reĝo, jam vestita, transiris en la atendejon, kie kolektiĝis lia sekvantaro: pastroj, oficiroj kaj oficistoj. Poste li forlasis la palacon kaj iris en la eksteran korton.

Tio estis vasta placo, kie sub la ombro de akacioj la laboristoj atendis la princon. Ĉe sono de trumpeto ĉiuj salte leviĝis de l' tero kaj stariĝis en kvar vicojn.

Ramzes, ĉirkaŭita de brilanta kortego, subite haltis, volante en la komenco de malproksime rigardi la regimenton de fosistoj. Tio estis nudaj homoj, kun blankaj kufoj sur la kapo kaj samaj tukoj ĉirkaŭ la koksoj. En la vicoj oni povis facile distingi la brunajn egiptanojn, nigrajn negrojn, flavajn azianojn kaj blankajn loĝantojn de Libio kaj de la insuloj de Mediteraneo.

En la unua vico staris la fosistoj kun pintohakiloj, en la dua kun pioĉoj, en la tria kun fosiloj. La kvaran vicon formis la portistoj, ĉiu kun levilo kaj du siteloj, la kvinan ankaŭ portistoj, sed kun grandaj kestoj, kiujn ili portis duope. La lastaj portis la elfositan teron.

Antaŭ la vicoj, ĉiun kelkdekon da paŝoj, staris la majstroj: ĉiu havis en la mano dikan bastonon aŭ lignan cirkelon, aŭ ortilon.

Kiam la princo proksimiĝis al ili, ĉiuj ĥore ekkriis: «Vivu eterne!» kaj ekgenuinte ekfrapis la teron per la frunto. La kronprinco ordonis al ili leviĝi kaj ree atente rigardis ilin.

Ili estis homoj sanaj kaj fortaj, tute ne havis aspekton de tiaj, kiuj de du monatoj vivis per almozoj.

Al la vic-reĝo proksimiĝis la nomarĥo Sofra kun sia sekvantaro. Sed Ramzes ŝajnigis, ke

li ne vidas lin kaj sin turnis al unu el la majstroj.

—Ĉu vi estas la fosistoj de Sohem? —demandis li. La majstro falis teren sur la ventron kaj silentis.

La princo levis la ŝultrojn kaj kriis al la laboristoj: —Ĉu vi estas de Sohem?

—Ni estas la fosistoj de Sohem!..-— respondis ili ĥore.

—Ĉu vi ricevis la salajron?

—Ni ricevis la salajron. Ni estas sanaj kaj kontentaj —servistoj de lia sankteco —respondis la ĥoro, martelante ĉiun vorton.

—Malantaŭen!..-— komandis la princo-— Oni trompas min — pensis li. Li ordonis al laboristoj iri en la kazernojn, kaj ne salutante nek adiaŭante la nomarĥon, li revenis en la palacon.

—Ĉu ankaŭ vi diros al mi, — demandis li dum la reiro Tutmozison, —ke ili estas laboristoj de Sohem?...

—Ili ja mem tion diris —respondis la kortegano.

La princo ordonis alkonduki ĉevalon kaj forrajdis al la armeo, kies tendaro estis ekster la urbo.

La tutan tagon li ekzercis la armeon. Ĉirkaŭ la tagmezo, sur la kampo de l' ekzercoj aperis kelkdeko da portilistoj, komandataj de l' nomarĥo, kun tendo, mebloj, manĝaĵo kaj vino. Sed la princo resendis ilin en la urbon, kaj kiam venis la horo de la tagmanĝo de l' soldatoj, li manĝis ilian hordean panon kun seka viando.

Tio estis dungitaj libiaj regimentoj: Kiam la princo vespere ordonis al ili demeti la armilojn kaj adiaŭis ilin, ŝajnis, ke la soldatoj kaj oficiroj freneziĝis. Kriante: «Vivu eterne!», ili kisis liajn manojn kaj piedojn, faris portilon el lancoj kaj manteloj, kun kantoj portis la princon en la urbon kaj ĉiuj volis havi sur siaj ŝultroj la karan ŝarĝon.

La nomarĥo kaj la oficistoj de la provinco, vidante la entuziasmon de la barbaraj libianoj kaj la favoron de l' princo al ili, ektimis.

—Jen estas monarĥo!..-— murmuretis al Sofra la granda skribisto-— Se li ekdezirus, ĉi tiuj homoj mortigus per la glavo nin kaj infanojn niajn...

La nomarĥo eksopiris malĝoje al la dioj kaj sin rekomendis al ilia protekto.

Malfrue nokte Ramzes revenis en la palacon, kaj tie la servistoj diris al li, ke oni ŝanĝis lian dormoĉambron.

—Kial?

—Ĉar en tiu ĉambro oni vidis venenan serpenton, kiu tiel sin kaŝis, ke oni ne povas trovi ĝin.

La nova dormoĉambro estis en flanka konstruaĵo, najbara al la domo de la nomarĥo. Tio estis kvarangula ĉambro, ĉirkaŭita per kolonoj. Ĝi havis alabastrajn murojn, kovritajn per pentrita plata skulptaĵo, prezentanta malsupre kreskaĵojn en vazoj, supre —girlandojn el olivaj kaj laŭraj folioj.

Preskaŭ en la mezo staris granda lito, inkrustita per ebono, eburo kaj oro. La ĉambron lumigis du bonodorantaj torĉoj, sub la kolonaro estis tabloj, ŝarĝitaj per vino, manĝaĵoj kaj rozaj kronoj.

En la plafono estis granda kvadrata truo, kovrita per tolo.

La princo sin banis, kaj kuŝiĝis sur la mola lito, liaj servistoj foriris en pli malproksimajn ĉambrojn. La torĉoj komencis estingiĝi, en la dormoĉambro ekblovis freŝa vento, saturita per odoro de floroj. Samtempe eksonis supre mallaŭta muziko de harpoj.

Ramzes levis la kapon. La tola tegmento malaperis, kaj tra la truo en la plafono oni vidis la stelaron de Leono, en kies mezo brilis la stelo de Regulus. La muziko de l’ harpoj plilaŭtiĝis.

—Ĉu la dioj intencas fari al mi viziton?..-— pensis Ramzes kun rideto. En la truo de la plafono ekbrilis larĝa luma strio; la lumo estis forta, sed delikata. Post momento aperis supre portilo en formo de ora ŝipo kun flora laŭbo; la kolonoj estis envolvitaj per girlandoj el rozoj, la tegmento estis el violoj kaj lotusoj.

Sur ŝnuroj, kaŝitaj en verdaĵo, la ora ŝipeto senbrue malleviĝis en la dormoĉambron. Ŝi haltis sur la planko kaj el sub la floroj eliris admirinde bela virino. Ŝia korpo similis blankan mar-

moron; de la sukcena ondo de l' haroj fluis ebriiganta odoro.

Elirinte el la aera portilo, la virino ekgenuis antaŭ la princo.

—Ĉu vi estas la filino de Sofra?— demandis ŝin la princo.

—Vi diras la veron, sinjoro.

—Kaj malgraŭ tio vi venis al mi!

—Petegi, ke vi pardonu al mia patro... Malfeliĉa li estas! de la tagmezo li verŝas larmojn kaj tordiĝas en la cindro.

—Kaj se mi ne pardonus al li, ĉu vi forirus?

—Ne.-— murmuretis ŝi mallaŭte.

La kronprinco altiris ŝin al si kaj pasie kisis. Liaj okuloj flamis.

—Pro tio mi lin pardonos — diris li.

—Oh, kiel bona vi estas!..-— ekkriis ŝi, karese sin premante al la princo, kaj poste aldonis kokete:

—Ĉu vi ordonos kompensi al li la perdojn, kiujn kaŭzis al li ĉi tiu furioza laboristo?

—Mi ordonos...

—Kaj vi prenos min en vian domon...

—Mi prenos vin, ĉar vi estas bela.

—Ĉu vere?..-— respondis ŝi, ĉirkaŭprenante lian kolon-— Rigardu min pli bone... Inter la belulinoj de Egipto mi okupas nur la kvaran lokon.

—Kion tio signifas?

—En Memfiso aŭ proksime de Memfiso loĝas via unua... Feliĉe, ŝi estas nur Hebreino!... En Sohem estas la dua...

—Nenion mi scias pri tio — interrompis la princo.

—Ha, vi kolombo!... Do vi kredeble ne scias ankaŭ pri la tria en Anu...

—Ĉu ankaŭ ŝi apartenas al mia domo?...

—Maldankema! —ekkriis ŝi, frapante lin per lotusa floro-— Vi estas kapabla post unu monato diri la samon pri mi... Sed mi ne permesos maljuste agi kontraŭ mi.

—Same kiel via patro.

—Vi ankoraŭ ne forgesis?... Memoru, ke mi foriros...

—Ne, restu... restu...

En la sekvinta tago la vic-reĝo bonvolis akcepti festenon de la nomarĥo Sofra. Publike li laŭdis lian administradon de la provinco, kaj por kompensi la perdojn, kaŭzitajn de la ebria laboristo, li donacis al li duonon de la vazoj kaj mebloj, kiujn li ricevis en la urbo Anu.

La alian duonon prenis la filino de la nomarĥo, la bela Abeb, kiel kortega sinjorino. Krom tio ŝi ordonis pagi al si el la kaso de Ramzes kvin talentojn por vestoj, ĉevaloj kaj sklavinoj.

Vespere la princo oscedante diris al Tutmozis:

—Lia sankteco, mia patro, diris al mi grandan veron: la virinoj kostas multe!

—Pli malbone estas, kiam oni ne havas ilin —respondis la elegantulo.

—Sed mi havas kvar kaj mi eĉ ne scias bone, kiamaniere. Mi povus cedi al vi almenaŭ du.

—Ĉu ankaŭ Saran?

—Ŝin ne, precipe, se ŝi havos filon.


—Se via ekscelenco destinos al ĉi tiuj turtinoj belan doton, oni trovos por ili edzojn.

La princo ree oscedis.

—Mi ne amas aŭskulti pri dotoj— diris li -—Aaa... kia feliĉo, ke mi jam forŝiros min de vi kaj ekloĝos inter pastroj...

—Ĉu vere vi faros tion?...

—Mi devas. Fine eble mi ekscios de ili, kial la faraonoj fariĝas malriĉaj... Aaa!.. kaj krom tio... mi ripozos.



# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPRANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **c/ Jabonerías, 6-3º D**
**E30010 MURCIA,**
**HISPANIO**

**Retskribu al**
**jesuo@ono.com**

http://www.gazetotekolanti.com/hale/k78.pdf




**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**
ISSN 1697-6460